

& La soldato kiu marŝas:

< Rekante 15 el 31 batoj por strofo, entute 434 paŝoj dum 4 minutoj. Poemon verkis Claude Piron. Baladigis Martin Strid per tradicia marŝo dalekarla kun nova rekantaĵo.>

(#Melodio:

<:31> (/DoDo DoLA DoDo DoDo; TIDo TILA ; TITI TITI; DoDo DoLA DoDo DoDo; TIDo TILA TITI TITI;

(#Rekantaĵe: Do Re Mi Mi Re MiFa Mi; La Tire do TiLa Si i La a;)

)×14)+

(&Strofoj:

'1 /La soldato kiu marŝas ; en la vento ; en silento ; sur la vojo kiu marĉas ; sian korpon ne plu sentas.

(×: **Marŝu fale plu al batal' ; Trivas la vivo soldata.**)

'2 Lia menso fakte brutas ; nur la laco ; kaj l' agaco ; de la pluvo kiu gutas ; senkompatate lin turmentas.

'3 Kaj li iras plu malbone ; pri la koto ; sur la boto ; kiu ĉiam pezas ĝene ; kaj la vojon malglatigas.

'4 Dum sufero monopole ; la kadenco ; en la menso ; regas ĉion malbonvole ; kaj la povon pensi ligas.

'5 Kaj li marŝas en la vico ; uniforma ; unuforma ; sur vetera la malico ; kaj la moko de la serĝent'.

'6 Li delonge jam maldormas ; kaj oscedo ; kun obsedo ; en makzelo mem sin formas ; pro nerezistebla tent'.

'7 Se li povus eĉ almoze ; ekricevi ; rajton revii ; kaj minuton nur ripoze ; halti sur la voja bord'.

'8 Sed li tion ne esperas ; ĉar la revo ; pro la devo ; en soldato ne aperas : ; jen la militserva sort'.

'9 Jam tro pezas la pafilo ; kaj la kasko ; kaj la sako ; kaj la kaĉo el argilo ; gluiĝinta ĉe la ŝu'.

'10 Sed la fora horizonto ; plej perfide ; malrapide ; malebligite al renkonto ; ĉiam foren fuĝas plu.

'11 La soldato kiu laca ; daŭre iras ; li sopiras ; al ripoza vivo paca ; sen ĉiama plua pel'.

'12 Sed li sentas kun eknaŭzo ; ke la vivo ; en aktivo ; daŭras ade kaj sen paŭzo ; ĝis neatingebla cel'.

'13 Kaj samkiel en armeo ; la rezono ; pri ordono ; ne ekzistas pro obeo ; kun neeblo de escept'.

'14 Tiel mankas la kompreno ; pri la motivo ; de la vivo ; kaj nur regas ĉi sinteno : ; plua iro kaj akcept'.)